katolika sento

6 JARO 54a U.E.C.I.



KATOLIKA SENTO

BOLLETTINO DELLA
UNIONE ESPERANTISTI
CATTOLICI D'ITALIA
(U.E.C.I.)

Anno 54° - 1975

Autorizzazione Tribunale
di Milano N. 6536 del 6.4.1964

Direttore Responsabile:
DON FERDINANDO LONGONI
Via S. Ambrogio 2
Telef. 99.60.050
20051 LIMBIATE (MI)

Redattore per la
Voce Esperantista di Roma:
P. GIACINTO JACOBITTI
Piazza Santa Maria Maggiore 8
Telef. 738.515
00185 ROMA
Poŝtĝirkonto 1-37638

Redattore
del Bollettino U.E.C.I.:
SIG. GLAUCO CORRADO
Via Palmanova 28
20132 MILANO

Presidente:
P. ALBINO CICCANTI OFM
Via S. Bernardino 26
47037 RIMINI (Fo)

Tesoriere:
DR. CARLO CESARE FERRARI
Viale dei Mille 37
Telef. 267.895
20129 MILANO
Poŝtĝirkonto 3-7791

Segretario:
DR. FRANCO GALBUSERA
Via della Ghiacciaia 3
Telef. 045 - 22.062
37100 VERONA

ABONKOTIZON
AL KATOLIKA SENTO
SACERDOTOJ POVAS PAGI
ANKAŬ PER CELEBRO
DE DU S. MESOJ,
PRI KIUJ ILI BV. INFORMI
P. JACOBITTI
AŬ PASTRO DUILIO MAGNANI
VIALE C. ZAVAGLI 73
RIMINI

Quota di abbonamento L. **2500**

Abonkotizo *italliroj* **2500**

KATOLIKA SENTO

nº 6

54a Jaro Junio 1975

LA LUMO DE EŬKARISTIO SUPER LA DESTINOJ DE LA HOMARO

(Homilio de la Sankta Patro dum la celebrado de la Kristokorpa Festo en Placo Sankta Petro)

Fratoj,

ĉi tiu liturgio de la "Kristokorpo",tiom aparta kaj tiom solena, havas la karakteron de repensado. Nia pripenso reiras al la nokto de la Sankta Ĵaŭdo, tiom intence signifoplena por Jesuo, la Majstro, kiu malfermis tiun paskan vespermanĝon per vortoj plenaj de intensa kortuŝo, de amema korinklino kaj de pasii-gaj antaŭvidaj testamentoj: "Mi arde deziris manĝi ĉi tiun Paskon kun vi, antaŭ ol suferi..." (Lk. 22,15). Maltrankviliga scivolemo okazigas tiam eksterordinaran streĉon inter la kunmanĝantoj, dum Jesuo faras nekutimajn gestojn, kia estas la lavado de la mizeraj piedoj de la disĉiploj, kaj eldiras parolojn ekstreme dolĉajn kaj gravajn, disdonante, je iu difinita momento,panon kaj vinon, al kiuj estis tiel radike atribuitaj novaj, kvalifikaj kaj esencaj difinoj pri lia korpo kaj lia sango, ke la manĝo transformiĝis al ofero, en kiu la paska ŝafido, tiam manĝata, cedis sian jarcentan kaj historian valoron, de simbolo nacia kaj liberiga, al ĉeesto de aŭtentika, profetita kaj profetanta, sava viktimo, unika, universala kaj ĉiamdaŭra. Poste, la komi-

sio de la frata amo, poste la doktrino de la ĉiama kuneco de Jesuo kun la siaj, kaj la alterna sinsekvo de la sufero kaj de la ĝojo, antaŭvidita por la fidelaj sekvantoj de la Majstro trans lia sentebla malapero, kaj poste la ripetita antaŭanonco pri la viviga misio de la Parakleta Spirito, kaj, fine, kvazaŭ krone al la mesia ekonomio, la fina kaj sacerdota preĝo de la Sinjoro, ŝvebanta inter ĉielo kaj tero, kiel himno ensorbanta en la transcendan unuecon la superegajn destinojn de la elaĉetita homaro.

Tro da aferoj por ni! tuj ensorbitaj de la kruda kaj heroa dramo de la Pasiono de l' Sankta Vendredo, kaj fine, de la posta dramo, preskaŭ nekonceptebla pro ĝia plej alta feliĉo mem, de la reviviĝo de la Sinjoro, ĝuste Li, sed tiel mirinde vivanta, ke oni ne povas ĝin enteni en la kutimaj skemoj de nia ordinara pensmaniero.

Ĉi tiu abundo de faktoj, de vortoj, de profetaj rilatoj kun la pasinteco kaj kun la futuro, formanta la tre densan bildon pri la paska mistero, devigas nin, kiel ni ĵus diris, al repensado kaj al serĉado de la centra punkto, kie la superabunda realo kondensiĝas al esprimo simbola, t.e. sakramenta, kaj pro tio mem transcendas la limojn de la kontingenco materia kaj momenta, kaj disverŝiĝas, kiel lumo el sia fokuso, kaj iĝas alireble por tiu, kiu malfermas la okulojn sur tiun saman lumon, la okulojn de la kredo, kaj, transpasante la limojn de la spaco kaj de la tempo kaj tiujn de niaj eksperimentaj leĝoj, ĝin igas sia, kiel estis en la intenco de la Sinjoro, ĉe la ekbruligo, kun supera potenco, kun senfina amo.

Jen, ni, tremantaj ja pro miro kaj pro ĝojo, malfermas ĉi tiun kapablon riceveman kaj profundan de nia spirito; kaj ni ekkrias: Mistero de Kredo! transirante tiel la sojlojn de la mirindega regno de Dio, al kiu

estis nin invitinta, kvazaŭ al supera renkontiĝo, tiu paska bankedo de la Sinjoro en la antaŭtago de lia elaĉeta pasiono. Jes, ni kredas, ho Sinjoro! sed Vi,Vi mem, helpu nian nekredemon (Mk. 9,24). Tiam, jen, la teologia sceno brilegas antaŭ ni; kaj ni neniam povas ĝin tutan kontempli, ĝui, kompreni. La animoj, trejnitaj al ĉi tiu eksterordinara vido, tion bone scias. Por ion kompreni oni devas nun elekti kaj fiksi la rigardon al unu aparta fragmento de la granda bildo. Kia fragmento hodiaŭ por ni? Unu vorton Vian ni aŭskultas en ĉi tiu momento, ho Sinjoro; vorton Vian elektitan el tiu Via parolado en Kafarnao, parolado de komentario, de polemiko kaj de revelacio, kiun Vi, ho Sinjoro, sekvigis al la miraklo de la multobligado de la panoj por la amaso de proksimume kvin mil personoj, venintaj por serĉi Vin, trans la lago de Tiberiado, preludon kaj simbolon de la starigo de l'Eŭkaristio. Al ĉiuj ankoraŭ petantaj panon por la natura malsato, Vi, ho Sinjoro, ripetis: "Mi estas la pano de la vivo; kiu venos al mi ne suferos pro malsato, kaj kiu kredos je mi neniam suferos pro soifo". (Jo. 6,35), nome vi okazigis la rimarkon pri alia malsato kaj pri alia soifo ol tiu de la surtera vivo, al kiu Via mirakla boneco estis, la antaŭan tagon, disdoninta nutraĵon senpagan kaj abundan; kaj tiel multajn aferojn vi instruis, kiuj validas ankoraŭ, validas ĉiam, ankaŭ por ni tiom malproksimaj de la lokoj kaj de la tempoj, kiuj havis Vin fizike ĉeestanta.

Vi instruis al ni, ke la bezonoj de la vivo surtera kaj ekonomia meritas ja la interesiĝon de la socio, la saĝan kaj tujan agadon de la homoj, fratigitaj pro nova motivo, pro la nekontestebla komuna bezono de tiu pano, kiun la tero povas doni, kaj donas al tiu, kiu al ĝi malavaras, ŝvitante kaj preĝante, siajn saĝajn penadojn. La solidareco inter la homoj, pro la sufero kaj la bezono kaj pro la perspektivo de iu ilia kreskanta

bonstato kaj de pli justa partopreno de ĉiuj en la teraj havaĵoj, neniam estos forgesata, nek malzorgata de ĉiuj, kiuj nomiĝas kristanoj, kaj estas fidelaj sekvantoj de Via Evangelio; eĉ estos por ili agrabla kaj severa sindevigo des pli multobligi la terajn panojn ju pli granda estas la malsato, nome la bezono kaj la sufero, kiuj ilin postulas, kaj al tio estos por ili urĝa instigo kaj senkompara premio, scii, ke ĉi tiu strebado ekonomia kaj socia estos en ili subtenata de amo, kiun Vi so la povas doni en ĝia agokapablo kaj en ĝia beleco, la karitato. Kaj Vi, ho Sinjoro, faru ke al ĉi tiu supera leĝo de kristana socialeco ni povu doni veran, humilan, amikan, konstantan ateston.

Sed samtempe Vi instruis al ni, ho Sinjoro, ke ne per nura pano tera vivas la homo (Mt. 4,4), ĉar ne nur al la teraj destinoj estas vokata nia vivo: kaj ke al la supernaturaj destinoj, prezentataj al ĉi tiu nia naturа ekzisto, Via parolo, Via elaĉeto, Via kuneco estas por ni nepre necesa Pano de eterna vivo.

tr. C.M-P.M.

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

ALIĜIS AL LA 36ª IKUE-KONGRESO EN ROMO

257 Olivan Salvador
258 Mauchien Renée
259 Ragazzon Fabiano
260 Leeb François
261 Coccia-Toraldo G.
262 Bielsa Joaquìn
263 Cielślik Elzbieta
264 Sinnema-De Vetten
265 Serratrice Emma
266 Pjlak Boleslaw
267 Filip Maria
268 Puacz Nikolaus
269 Szymanska Krystyna
270 Kwiatowska Irena
271 Kwiatowska Grazina
272 Bak Renata
273 Jakubiec Wieslawa
274 Kominek Bozena
275 Bandurak Iwona
276 Marcetta Emerica

277	N. N.	286	Kozyra Stanislawa
278	Gilewska Jadwiga	287	Struska Helena
279	Karolewicz Jadwiga	288	Glabik Ewa
280	Smikalski Jan	289	Janaszek Arkadiusz
281	Scaparotti Lucia	290	Maliszewska Teresa
282	Professione Clara	291	Heine Halina
283	Rzeszutek Zofia E.	292	Mamrot Jolanta
284	Bienkowska Maria	293	Poterucha Barbara
285	Jedynack Cecilia	294	Baran Zbigniew

Ĝis nun 294 el 14 nacioj; t.e.:
172 el Pollando; 65 el Italujo; 15 el Francujo; 8 el Nederlando; 7 el Hispanujo; 6 el Germanujo; 5 el Jugoslavio; 3 el Hungarujo kaj el Belgujo; 2 el Aŭstrujo; 1 el Norvegujo, Usono, Ĉeĥoslovakio kaj Britujo.

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

FERVOJAJ RABATOJ

Kvankam niaj klopodoj tuj celis ricevi fervojajn rabatojn favore al niaj kongresanoj, tamen oni ne sukcesis akordiĝi kun la kompetentaj instancoj, ĉar pro la nunaj financaj malfacilaĵoj, ekde la pasinta jaro neniu kongreso, granda aŭ malgranda, ĝuas pri apartaj rabatoj. Restis validaj nur la ĝeneralaj rabatoj, kiuj taŭgas por ĉiuj, eĉ ne familianoj aŭ kongresanoj.

Unu el ĉi tiuj estas la 20 % rabato ĝuebla de grupoj laŭ minimume 10 kunvojaĝantoj. La rabato estas kalkulata sur la kosto de iu' ajn, longa aŭ mallonga, fervoja vojaĝo. Kaj por tion ricevi sufiĉas prezenti la kompletan liston de la vojaĝantoj al la biletvendejo.

Alia rabato, same de ĉ. 20 procentoj, nomiĝas "biglietto chilometrico" (laŭkilometra bileto), kaj validas por 3.000 kilometra vojaĝo, dividebla ankaŭ laŭ pluraj, maksimume 5 personoj. La bileto kostas 26.000 lirojn, va

lidas tra la tuta itala fervoja reto kaj daŭras monaton. Praktike, por eksterlandanoj, kiuj iras al Romo, la bileto estas konvena, se ili estas 3 personoj. Ĉi tiu bileto (por 2a klaso) estas aĉetebla ĉe fervojaj stacioj aŭ vojaĝagentejoj. Se iu tion deziras, ni povas sendi al li la bileton kontraŭ antaŭpago de £. 26.000 plus sendkostoj.

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

NI POVAS KUN PLEZURO ANONCI, ke ni sukcesis havi specialan poŝtan stampon por la inaŭgura tago de nia IKUE-kongreso (12-8-'75). Ĉar ĉi tio, kiel konate, faras la ĝojon de multaj filatelistoj, aparte nombraj en nia movado, ni kalkulas, ke ankaŭ la demando de niaj kongresaj bildkartoj kun ĉi stampo estos intensa.

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

AL ĈIU KONGRES-PARTOPRENANTO NI DONACOS en memoriga plastika saketo ĉi tiujn objektojn:

1 Membrokarto de IKUE-Kongreso
2 Insigno IKUE
3 Kristana Esperanto Jarlibro (IKUE-KELI)
4 Broŝuro en E. pri la pilgrimado
5 Bildkartoj memorigaj de la Kongreso
6 Bildetoj pri Nia Sinjorino de la Espero
7 Preĝo honore al S. Francisko
8 La plej belaj turismaj prospektoj pri italaj urboj
9 Membrokarto de la Pilgrimanto kun asekuro kontraŭ ev. akcidentoj dum la pilgrimado
10 Libro de la Pilgrimanto - laŭ unu el la jenaj lingvoj: itala, angla, franca, hispana, germana, portugala.
11 Insigno pri la Sankta Jaro
12 Memoriga medalo de la Sankta Jaro

13 Senpagaj aŭ rabataj biletoj por muzeoj
14 Granda mapo de Romo

ROMA ESPERANTA VOĈO

n° 140

NIA VALORA S-ANO, la Pola kapuceno P. Georgo Koritkowski, brile doktoriĝis je la 19a de junio 1975 en la Pontifika Ateneo "Antonianum" de Romo, defendante la tezon: "La problemo de la helpa internacia lingvo kaj la Eklezio en la nuntempa mondo". Al la escepta evento, kiu estos memoriga en la esperantista movado, ĉeestis multaj amikoj de la nova doktoro kaj reprezentantoj de la Roma esperantista grupo. Ni nun esperas, ke la tre interesa verko baldaŭ aperos en la esperanta lingvo, tiel sekvante la unuan lian eseon (1973), iel en kondukon al ĉi tiu tezo, nome: "Ekumenismo kaj Internacilingva problemo", kiu jam diskonigis lin en la internacia kampo.
Nia fervora samideano ricevis de profesoroj kaj ĉeestantoj la plej merititajn gratulojn; kaj la Roma katolika grupo fieras pri li kaj bondeziras al li ĉiam luman, daŭran kaj fruktodonan apostolecon.

NI AVERTAS, KE POST LA FINO de ĉi tiu monato ne plu okazos la Meso en Esperanto en S. Prakseda, escepte de tiu indikita en la kongresa programo. Ankaŭ la kutimaj kunvenoj ĉesos ĝis la 5 de oktobro.
Al tiuj, kiuj libertempos dum la somero, niajn bondezirojn. Al tiuj, kiuj partoprenos en nia IKUE-kongreso:
ĜIS BALDAŬ!

El la Katolika Eklezio

Parolante pri paco en la ĝenerala aŭdienco de la 4a de junio, la Papo diris interalie:

"LA PACO, KIUN AŬGUSTENO difinas: "trankvilo de ordo"... estas antaŭ ĉio la paco de la koro, estas tiu animstato de justeco, boneco, sereneco, kiu igas nin respektoplenaj kaj bonvolemaj al ĉiuj, kaj forprenas de nia animo tiujn sentojn, kiuj interrompas la almenaŭ eblan cirkuladon de la amo al proksimularo. La paco postulas sian psikologion, sian moralan spiriton, kiu, antaŭ ol ĝi turniĝos al la aliaj, reflektiĝas sur tiujn, kiuj volas praktiki ĝin. Antaŭ ol esti socia, la paco estas persona.

Kaj ĝuste ĉi tiu spirito de paco estas devo de vera sekvanto de Kristo. Ĝi estas frukto de karitato. Ĝi ne estas, do, egoismo, apatio, malinteresiĝo aŭ malestimo pri aliaj por sia propra trankvilo...

La paco de Kristo! Kia anonco renoviganta kaj konsola, kompare kun eksplodoj de la senbrida energio de orgojlo kaj de la homaj pasioj!

Oni devas fari tiujn komparojn, kun humileco kaj saĝo, ne por refali en arogantajn kaj kontraŭstarantajn polemikajn reagojn, sed por primemori du aferojn. La unua: ke la paco, pri kio la kristanismo asignas al ni internan kaj personan devon, ne estas nenifarado nek egoisma posedaĵo, kiu promesas trankvilajn kaj komfortajn vivkondiĉojn; paco, ja, estas ordo, sed ordo rilatanta tion, kio estas plej movebla, kia estas la homa vivo; pro tio la paco, se ni ĝin volas vera kaj daŭra, estos vigla kaj aktiva; paco senĉese produktata kun kreanta amo kaj laborriĉa aktiveco; oni ne nur devas ĝin ĝui, sed ĉiam celi (v. Ps.:33,15: priserĉu la pacon kaj

postsekvu ĝin).

La dua memoriginda punkto estas la religia kaj kristana motivo, kiun oni devas meti ĉe la radiko de la paco: la estimo kaj la universala amo por la homo, kiel estis montrite al ni de Jesuo Kristo. La tuta evangelio instruas tion al ni. Ni ne forgesu, ke ĉi tiu estas la unua motivo, kiu glatigas vojon al la granda devo de la paco!".

TRE INTERESA ESTIS LA RAPORTO pri kulto al Maria en la Anglikana Eklezio, farita de resp. John Milburn en la Internacia Maria Kongreso (21/V). Fakte iom post iom la Anglikana Eklezio akceptis multajn instituciojn aŭ religiajn esprimojn de la katolika Eklezio, tiel, kun ekumena spirito, malpliigante la iamajn distancojn. Ekde la naskiĝo de la Anglikana Eklezio - diris Milburn - la anglikanaj religiuloj amis kaj honoris Marian. En iliaj privataj kapeloj ĉeestis bildoj kaj freskoj pri la Patrino de Dio. Kvin festoj honore al Maria restis en la liturgiaj libroj de la anglikanaj ordenoj. Sed dum kelkaj jarcentoj ili ne estis popularaj. Nun ĉi tio ne plu estas tiel. Ĉiutage kreskas la nombro de la parokaj preĝejoj, kiuj kun la anglikanaj ordenoj celebras tiujn festojn. La evoluado de la kulto al la Virgulino instigis fondon de religiaj asocioj. La plej granda virina organizacio disvastigita en la tuta mondo estas la Unuiĝo de Patrinoj. Ĝia celo estas akceli la konon, la respekton kaj imitadon de Maria, kiel de ideala ekzemplo de patrina vivo. En 1902 estis fondita la Ligo de Nia Sinjorino; en 1931 naskiĝis la Societo de Maria, instituto ĝis hodiaŭ floranta. Pli ol 5.000 estas ĝiaj membroj - laikoj kaj ekleziuloj - kiuj laboras en la maria apostolado. Ĉiu membro de la asocio akceptas la disciplinon de la katolika Eklezio kaj en siaj ĉiutagaj preĝoj recitas la Anĝeluson, la Rozarion, la litanion kaj la antifonojn de Nia Sinjorino.. Ĉiujare la membroj

kuniĝas kelkloke kaj celebras kune la monatojn de majo kaj de oktobro, la feston de la Ĉielenprenita kaj partoprenas en granda procesio. Krome, ĉiu membro zorgas por viziti sanktejojn forlasitajn kaj doni financan kaj materian helpon por vastigi la kulton al la patrino de Kristo.

De multaj jaroj la membroj de la societo organizas pilgrimadojn al Lourdes, kie la francaj ekleziaj aŭtoritatoj akceptas ilin kun granda afableco kaj frata gastamo. Unu el ĉi tiuj okazis ĉe la fino de majo. Kaj jam estas en programo, ke granda anglikana organizacio ĉeestu en Romo por partopreni en la celoj de la Sankta Jaro.

Kiu povas nun ne agnoski la intervenon de la Sankta Spirito kaj la propeton de la Dipatrino por la celo al unueco, kiu havas sian centron sur la unika aŭtoritato de la Papo? "Ni devas iri antaŭen laŭ ĉi tiu vojo - konkludis Milburn. Maria devas reveni inter nin kaj ni petas vian kunlaboron kaj viajn preĝojn, por ke ŝia triumfo estu plena".

"OIKOUMENIKON" - REVUO PRI EKUMENISMO. (Monata - Jarabono £.10.000). Dekkvin jaroj por monata revuo, kiu havas pli ol cent paĝojn por ĉiu kajero, ne estas malgrava afero. La fondintoj de ĉi tiu revuo estas la samaj, kiuj - ĉiam por la sama ekumena celo - eldonis en 1945 la monatan revuon "Michaël", kiel organon de la sammoma asocio por progresigo de la unuiga popola apostoleco; sekvis en 1946 la asocio kaj ĝia trimonata revuo "Unitas" por studo de ekumenaj problemoj; en 1947 la dusemajna rotaci-presita "L'Unità Cattolica", kiu rapide gajnis simpation de katolikoj kaj nekatolikoj; en 1948 la monata revuo "Operai del Signore" (Laboristoj de la Sinjoro), por varbado kaj formado de personoj dediĉitaj al la ekumena agado; en 1953 la monata revuo "La voce di S. Giuda Taddeo", por di

skonigi la "Apostolan Leteron" de ĉi tiu pioniro de la ekumenismo, kaj fine, en 1962, "Il Faro".

"Oikoumenikon" progresis ĉefe inter studemuloj de la ekumena demando kaj altiras intereson de pli kaj pli alta nombro da kristanoj kaj nekristanoj. Dum la celebro de la Dua Vatikana Koncilio la revuo aperis ĉiun du an semajnon por informi akurate pri ĝiaj ekumenaj aspektoj kaj rilatoj. Fariĝinte, poste, monata, dum ĉi tiuj lastaj dek jaroj ĝi donis precizan dokumentadon, se riozan kulturan profundigon kaj ĝisdatigitan informadon pri la ekumena fenomeno, ĉiam respektema pri ĉies ideoj kaj pozicioj. Por helpi ĉiujn, kiuj interesiĝas pri la grava temo kaj por faciligi la serĉadon de sia riĉa dokumentaro, la revuo donis en la lasta numero de la pasinta jaro precizan indekson de la tuta materialo publicita laŭ la 230 kajeroj.

LA GLORA DUMONATA REVUO "Civiltà Cattolica" festis je la 15a de majo sian 3000an numeron, renovigante pere de sia redaktoraro kaj administra personalo antaŭ la Papo, siajn proponojn ĉiam observitajn, de senkondiĉa obeado al la doktrino de la Eklezio kaj atento al ĉiuj modernaj problemoj, kiuj kelkmaniere devas esti prilumataj de la vorto de Kristo, lumo de la mondo, por kontribui al katolika civilizo. La revuo de la Jezuitoj naskiĝis en 1850, kaj dum siaj 125 jaroj servis kun ekzemplodona amo al la Eklezio. El la riĉega kolekto de ĝiaj plej aŭtoritataj studoj (de 1850 ĝis 1945) estis ĵus kompilitaj 4 volumoj.

INICIATE DE LA "CENTRO AZIONE LITURGICA" en Romo aperis la 'Misalo por Infanoj", laŭ la Direktivaro por la mesoj kun infanoj, aprobita de Paŭlo 6a je 22 de oktobro 1973. Jam antaŭe, en 1970 la CEI (Itala Episkopa Konferenco) decidis la Renovigon de la Katekizado, kaj ĉi tio enkondukis kaj akcelis ĉiujn iniciatojn ce le al pli profunda renkontiĝo kun Dio kaj al pli intensa



NE POVANTE DONI AL MULTAJ petintoj tutan mapon de Romo, (kiun ili ricevos kune kun la dokumentaro), ni kompilis ĉi tie por ili tiun parton, kiu povos utili al ili je la unua fojo. Per aŭtobuso nº64 (£.50), kiun ili suriros tuj elirinte de la Stacidomo, tra Piazza Venezia ili sin direktos al Corso Vittorio Emanuele. Je la fino de ĉi tiu strato, antaŭ la rivero Tevere, ili malsupreniros, kaj irante ĉirkaŭ 250 paŝojn laŭlonge de la rivero, maldekstre, ili atingos la preĝejon S.Giovanni dei Fiorentini, ĉe kies dekstra flanko startas la aŭtobuso n° 98, per kiu ili alvenos al nia Kongresejo "Domus Pacis" en via Torre Rossa, 94.

kristana vivo de infanoj. La eŭkaristia celebrado devas esti ne elirmomento de ilia vivo, sed orientigo de tuta ilia formado. Nome, la infanoj devas esti mankondukataj por malkovri kaj akiri la homajn kaj religiajn valoraĵojn, kaŝitajn en la eŭkaristia celebrado: komunuma agado, saluto, kapableco aŭskulti, pardonpeto kaj pardono, danko, kompreno de simplaj simbolaj agadoj, amikiĝo pere de festeno, celebrado de festo. Ĉiuj ĉi tiuj momentoj de la celebrado estas zorge celataj en la Misalo por Infanoj, kaj la simpla, facila parolmaniero kunigita al la bildo de ĉiu paĝo kondukas preskaŭ mane la infanon al malkovro de iu realo, kiu devas esti memorigata kaj celebrata ĉiam kiel "evento". Al la mesrito sekvas la "Propraĵo" de la or-

dinara tempo (la advento ĝis la 34a ordinara dimanĉo) kaj la "Proprajo de la Sanktuloj". En apendico: la rito de la pentofara kaj komunia sakramentoj kaj kelkaj preĝoj taŭgaj por infanoj.
Temas pri malgranda misalo, kiu certe helpos ilin pli bone kompreni la liturgian agadon, kiu apartenas al la tuta eklezia komunumo, kaj partopreni en ĝi.

CENTJARA AFRIKANO akceptita de la Papo. Ŝajnas historio eltirita de aventurromano.- Ĉe la fino de la 19a jarcento en la nigra Afriko estas la epoko de la grandaj esploradoj. Stanley kaj Livingstone penetras tra insidoj de sovaĝaj bestoj kaj misteraj arbaroj; la episkopo Massaja klopodas atingi diocezon, kaj neniu scias pri ĝia adreso; la boeroj batalas por novaj landlimoj de la homa aventuro. Grupoj da sklavoj revenas de Ameriko, por fondi novan ŝtaton, post kiam ili estis liberigitaj de Monroe; sed aliaj laŭiras kontraŭan vojon por esti vendataj en malpli liberalaj landoj.
Inter ĉi tiuj estas grupeto kaptita de malamikaj triboj ĉe la fontoj de la Volta-rivero, kies homoj grandaj kaj fortaj valoras kiel granda kvanto da salo. Ĉe-maleole katenitaj ili iras al Timbuktù. Laŭ regulaj intervaloj ili estas bastonataj, por ke ili entute rezignu pri liberiĝaj intencoj. Sed inter ili troviĝas iu, kiu ne submetiĝas. Dudekjara, li aspiras al liberiĝo, al la vastaj senlimaj savanoj, sub la fajra, sed amika suno. Li nomiĝas Ki-zerbò.
Dumnokte, iam li klopodas eskapi. Sed gardhundoj ĉirkaŭas lin kaj furioze bojante alkurigas la negristojn, kiuj rekaptas lin. Severa bastonado certe forprenos de li ĉian deziron de nova klopodo.
Sed li ne cedas. Kiam la vundoj resaniĝas, jen denove li forflugas. Trifoje li provas, kaj trifoje li estas reprenita. Kaj ĉiufoje la bastondozo kreskas. La tur

mentistoj cedas nur, kiam ili timas, pri lia supervivo. Mortigita sklavo nenion valoras. Ki-zerbò ĝemas, dum li jam planas ankoraŭ liberiĝon. Ĉi-foje li sukcesas! Li atingis en la profunda mallumo de la nokto la riveron, kiam la postkurantoj jam estas proksimaj. Rapide li sub akviĝas meze de la kanaro kun la nura nazpinto surakve por spiri, kun la espero, ke la marĉandistoj, opiniante ke li dronis, foriros. La tutan nokton li restis senmove, kaj longajn horojn de la mateno, ĝis pasis ĉe li barko de indiĝenoj. Kiam li certiĝis, ke ili ne estas malamikoj, per la lasta spiro, kiun li ankoraŭ havis, li helpkriis. Li apenaŭ perceptis, ke oni hisis lin, kaj svenis. Kiam li rekonsciiĝis, iu alridetis lin. Blanka vizaĝo, blanka vesto. Ĉeno kun bidoj kaj kruco ĉe la kolo. Tiam li ne sciis, ke ĝi estas rozario. La blankulo estis la misiisto patro Gelaiseque.

Zorge kuracita, Ki-zerbò tuj esprimis laŭpove siandankon. Li laboris kiel kuiristo, ĝardenisto, masonisto, flegisto. Li laboradis kaj lernadis; kaj li avidis koni Dion, kiu estas patro de ĉiuj kaj ĉiujn volas liberaj. En 1897 li estis preta por la bapto. Neniam li povus forgesi tiun jaron, eĉ se li vivus cent kromajn jarojn.

Poste li mem gvidis la Blankajn Patrojn al siaj landoj, dumvojaĝe dissemante la dian vorton. Kiam en 1913 li alvenis al sia vilaĝo, Tomà, granda estis la ĝojo, per kiu la "reviviĝinto" estis akceptita. Ĉiuj 3000 loĝantoj volis fariĝi filoj de Dio sub la gvidado de la katekisto Ki-zerbò. Tie li edziĝis kaj instruante, laborante, baptante ankaŭ ĉe la apudaj vilaĝoj, li estis nelacigebla. Li havis 14 gefilojn, sed sennombraj estis la spiritaj. Neniu scias kiom da homoj li baptis, precipe dum la oftaj epidemioj. Nun li havas 30 nepojn kaj ĉirkaŭ 200 pranepojn. Kompreneble, ĉiuj kristanoj. Eklezio de li generita.

La Eklezio de la Alta Voltao floradis kaj Ki-zerbò mal

juniĝis. Li havis jam nun nur unu deziron: vidi la Papon. Kaj fine la revo fariĝis realaĵo. Je la 6a de junio 1975, post rapida flugado tra la nemezureblaj vastaĵoj, kiujn li iam trairis piede, la centjara maljunulo atingis trans la maro, kiun li neniam antaŭe vidis, Italujon, Romon, S.Petron. La Papo akceptis privataŭdience lin (v.p.135) kun unu el liaj filoj, diplomita en Sorbono, aŭtoro de "Historio de Afriko" kaj redaktoro de la "Histoire générale de l'Afrique", la granda enciklopedio de la nigra kontinento, membro de la Agada Konsilio de UNESCO, fondinto de politika partio de Alta Voltao, la Movado por Nacia Liberiĝo (MLN) kaj profesoro pri politikaj sciencoj. Kaj kun vortoj esprimantaj respekton, dankon kaj admiron, la Papo mem volis dekoracii per ora kaj emajla kruco kun la ruĝa kaj nigra rubando, kiel kavaliron de la Sankta Silvestra Ordeno, la centjaran maljunulon Ki-zerbò, kies okuloj brilis pro larmoj de neesprimebla ĝojo.

UGANDO.-KAMPALA. Fratino Silvia Probst, el Svislando, ricevis de prezidento Amin la ugandan civitanecon. Ŝi laboras en tiu lando jam de dek kvin jaroj. Unue ŝi estis edukistino, poste ŝi laboris en la "Katolika Ofico" de Kampala kaj, dum ĉi tiuj lastaj jaroj en Societo "Ibanda Nutrition Init". Ĉi tiu asista societo funkciadis komence per siaj propraj rimedoj kaj poste ricevis financajn helpojn de la svisa organizacio "Brucke Bruderhilfe". La ministro por la Saneco komunikis al fratino Silvia, ke la Prezidento decidis doni al ŝi la ugandan civitanecon pro ŝia kontribuaĵo al la progreso de tiu asista asocio kaj de la tuta lando ĝenerale. Prezidento Amin donis ankaŭ permeson de stabila rezido, pro la laboro farita, al kvar laikaj misiistoj, apartenantaj al la kuracista grupo "Saint Francis Leprosy Centro" de Buliba en la suda Busanga regiono.

La centro, malfermita en 1934 estas estrata de la misi istaj franciskaninoj. Aliaj kvar, kiuj ricevis rajton de stabila rezido estas M.Goes, el Nederlando, kiu laboras en Ugando jam de 50 jaroj; d.ro Blenska, poldevena, de angla nacieco, en Ugando de 24 jaroj; D.roGrece Grant, irlandano kaj Fr-ino Bertkienwicz, pola,kaj en Ugando respektive de 10 kaj 18 jaroj.

ĈIUSEMAJNE EL UGANDO alvenas grupo da pilgrimantoj. Ĉiufoje 170. Longa flugado el la malproksima Ekvatoro. La grupoj estas helpataj de la Uganda registaro, kiu asignis por siaj kristanoj milionon kaj duonon da dolaroj: verŝajne unika ekzemplo de ŝtato, kiu sentas la socian gravecon de jubileo. Kaj ĉiuspecaj faciligoj: por la sacerdotoj, kiuj akompanas, diplomata pasporto; du diplomatoj destinitaj al Romo por asisti la grupojn.

En la koro de Afriko la katolikoj, kvankam nur 40 procentoj de la tuta uganda loĝantaro, estas estimataj kaj respektataj. Kiel povus alie esti? Ili havas heredaĵon, kiu ĉiam subtenos ilin: 70 martiroj, kiuj per sia sango muldis semon al tiu Eklezio. Kiam ĉi tiuj pilgrimantoj surstrate aŭ en S.Petro, tra la svarmo de la aliaj multegaj, pasas modestaj, mildaj, ordigitaj post sia paŝtisto, sacerdoto blankevestita, portanta la pentofaran krucon, ili altiras la mirigitan rigardon de ĉiuj; flagras fotografistaj fulmetoj. Oni forgesas dum ilia irado kontempladon de la "Pietà" de Mikelanĝelo aŭ de la orumita plafono, ĉar aperas la vera ĉefverko: popolo, kies religio kaj kredo estas ne en eksteraj signoj, sed en la sango. Enirante la bazilikojn la okuloj de la negraj pilgrimantoj ne leviĝas al la statuoj, al la mozaikoj, al la fortikaj kolonoj, al la brilo de l'oro, al la multkoloraj marmoroj. Ili iras rekte al la konfesaltaro, kiu iam anoncis al la mondo la sanktecon de iliaj marti-

rigitaj antaŭuloj, por proklami apud la relikvoj de Petro la saman plej altan kredesprimon.

BURUNDO - BUJUMBURA. "Entrepreno Espero" estas la nomo donita de la saveranaj misiistoj al iniciato de ili enkondukita por instruado de junuloj kaj maljunuloj en la regiono Matara de la malgranda respubliko Burundo en la centra Afriko. Ĝis nun la iniciato atingis 2.500 personojn, kiuj kuniĝas en "aŭloj" el koto kaj pajlo por lerni legi kaj skribi. La lokaj saveranaj misiistoj, por favori la plenan progreson de la loĝantaro, kreis sociajn centrojn, akvokondukilojn, iniciatojn por purigo de 40 akvofontoj, lernejojn por katekistoj.

RODEZIO. - GWELO - La katolika presaĵaro de Gwelo, nomata la "Mambo Press", lanĉis novan dumonatan revuon pri kristana sento, kies titolo estas "Kristo". Ĝi celas afrikanojn kaj anstataŭas "Moto" kaj "Mambomagazine", kiuj estis malpermesitaj de la registaro. "Moto" ekzistis jam de 16 jaroj, kiam ĝi estis sekvestrita la pasintan septembron. Ĝi komenciĝis kiel monata revuo kaj fariĝis semajna ĉe la fino de 1971. Dum la lastaj dek jaroj ĝi plenumis pli kaj pli gravan taskon laŭ la politika vidpunkto, kiel proparolanto de la Rodeziaj afrikanoj. Tiel la registaro, akuzante ĝin kiel renverseman kaj incitantan al rasmalamo, unue malpermesis ĝin por tri monatoj, poste definitive, eĉ antaŭ ol la tri monatoj pasis, konfiskis la revuon. Post la tempa malpermeso de "Moto", la "Mambo Press" lanĉis alian semajnan revuon, "Mambo Magazine", kiu siavice falis sub la saman akuzon de la antaŭa ĵurnalo, kaj ankaŭ tiu estis definitive malpermesita. La nova semajna ĵurnalo "Kristo" klopodos resti en la ordonitaj limoj. Sed, kiel diris ĝia direktoro Patro Alberto Planger, "lanĉi kaj subteni hodiaŭ novan kristanan pe

riodaĵon en ĉi tiu lando, postulas kuraĝan kredateston".

KAMERUNO. - YAOUNDE' - La pres-entrepreno de S. Paŭlo festis 25 vivojarojn en Kameruno. Fakte en 1949 la Fratinoj de S. Paŭlo malfermis en Mvolyé, apud Yaoundé, sian unuan misian centron, efektivigante tiel la revon de sia Fondinto, la Friburga kanoniko Schorderet, kiu arde deziris, ke la kreitaĵo disvastiĝu en la misioj kaj sin metu je la servo de la junaj Eklezioj. De tiu momento aliaj fondaĵoj realiĝis, unue en Brazzaville kaj en Madagaskaro. Hodiaŭ laika tekniko kunlabore kun la fratinoj kaj aŭtoktona personalo, direktas la tipografion, kie presiĝas la franca ĵurnalo "L'effort Camerounais", la dumonata revuo en la evonda lingvo "Nleb Bekrosten" kaj aliaj verkoj je la servo de la Eklezio kaj de la loka loĝantaro. En la sama Yaoundé funkcias la Sankta Paŭlo-librovendejo por la ne malmultaj studemuloj. Kvankam la religiulinoj plenumas apostolecon pere de la preso, ili ne neglektas ankaŭ aliajn socikomunikajn rimedojn, kaj nun ili sin pretigas por entrepreni aŭdovidajn programojn helpe al la kredo.

KONGIO. - BRAZZAVILLE - "Kien iras la Kongia familio?" sin demandas kard. Emile Biayenda, ĉefepisko po de la respublika ĉefurbo. La kardinalo montras unue la negativajn aspektojn de la falkolizio de triba vivo kontraŭ la modernan konsumisman civilizon. "Multaj junuloj - skribas la kardinalo en paŝtista letero al siaj diocezanoj - ne toleras riproĉojn, ne dialogas kun la gepatroj kaj des malpli ili volas sin devontigi al laboro. Tiamaniere estiĝas zorgoplenaj familiaj situacioj, foraj kaj de la triba severa tradicio, kaj de la kristana vivo. Ilustrinte la dian planon pri familio kaj la spiritajn donacojn kunligitajn al la geedza sakramento, kard. Biayenda prezentas al la kristanoj la aktualecon de la dia desegno, admonante aparte la gepatrojn al la neforprenebla junulara rajto pri la libera elekto de viv- kunulo

aŭ kunulino. Rekomendante al la gefianĉoj la nepran postulon de reciproka kaj konstrua dialogo, necesa por estigi daŭran kaj fekundan estimon, la kardinalo konkludas admonante la gepatrojn, ke ili zorgu kun la plej kristana sento por edukiĝo de siaj filoj.

DEKLARACIO DE LA ANGLA EPISKOPARO pri la Roma misalo. - Okaze de la apero en Britujo kaj Kimrujo de la angla eldono de la Roma misalo, la episkopa Konferenco prezentis ĝin per deklaracio, kiu indas esti legata, pro sia klareco kaj pro la spirito, per kiu la episkopoj deziras, ke oni akceptu la novan misalon. Ĉar ŝajnas al ni, ke tiu deklaracio povas same interesi al sacerdotoj de multaj aliaj nacioj, ni volas prezenti ĉi tie ĝian tradukon. Jen la teksto:

"La unueco de la Eklezio estas en danĝero, se la normoj donitaj de la Sankta Seĝo por mescelebrado ne observiĝas. Bedaŭrinde troviĝas ankoraŭ kelkaj, kiuj ilin ignoras kaj daŭrigas diversspecajn eksperimentojn. La Sankta Seĝo deklaris, ke eksperimentoj ne plu estas permesataj kaj ke la normoj de la nova misalo devas esti fidele observataj. Tio signifas, ke la rubrikoj, nun ĝis minimume reduktitaj, kaj preskribitaj kiel ĉiam por garantii la dignon de la sankta ofero, devas esti respektataj. La justa postulo de vivanta liturgio povas esti efektivigata per la pluraj elekteblecoj donitaj de la nova misalo (ekz. por la penta esprimo kaj por la eŭkaristia Preĝo), sed ne enkondukante personajn liturgiojn. Kelkaj sacerdotoj ne respektas la liturgiajn leĝojn, kiuj koncernas la sanktajn vestojn kaj la preskribitajn tekstojn. Sacerdoto, kiu arbitre agadas, sekvante sian meson, kaŭzas gravan danĝeron al la animoj. Kaj ne povas descendi la dia beno sur tiujn, kiuj partoprenas en mesoj, kiuj ne estas celebrataj laŭ la eklezaj instruoj.

Je la kontraŭa flanko sin metas tiuj, kiuj forĵetas bloke la liturgian reformon. Ĉe ambaŭ kazoj ne ĉeestas fideleco kaj obeo al la Sankta Seĝo. Kelkaj katolikoj asertas erare, ke ili ne estas devigataj akcepti la restaŭritan liturgion. Oni asertas, ke la mesrito dekretita de Pio 5a povas esti laŭleĝe sekvata, anstataŭ tiu, kiu estis ordonita de Paŭlo 6a. Per ĉi tiu deklaracio la episkopoj intencas solene deklari, ke la misalo de Paŭlo 6a anstataŭas entute la aliajn misalojn de la Roma rito. Ĉi tiu estas leĝo de la Eklezio, kaj ĝi devas esti observata. Esceptoj estas faritaj por maljunuloj aŭ malsanaj sacerdotoj, kiuj povas daŭrigi celebradon de la meso private laŭ la antaŭa rito. Indulto donis eblecon al la anglaj episkopoj permesi al apartaj grupoj kaj ĉe apartaj okazoj uzi la malnovan riton, kun la modifoj donitaj en 1967, kondiĉe ke estu absolute forigita ĉiu disiga danĝero. Por devoteca motivo grupo povas ricevi permeson celebri la meson laŭ ĉi tiu rito. Sed en ĉiuj parokaj kaj komunecaj mesoj la nova rito en la latina aŭ en la angla estas deviga.

Kelkaj estis trompitaj per ia propagando, kiu atakas la roman misalon de Paŭlo 6a kaj eĉ akuzas la Sanktan Patron, kvazaŭ li proponas herezon per la novaj eŭkaristiaj Preĝoj. La episkopoj alte malaprobas tiujn kalumniojn kaj admonas pri obeado al la Sankta Seĝo. Kunige kun la episkopoj de la tuta Eklezio la Episkopa Konferenco de Britujo kaj Kimrujo proklamas fidelecon al la posteulo de Petro kaj esperas, ke per ĉi tiu deklaracio estos klare por klerikaro kaj fideluloj, ke la sankta meso devas esti celebrata laŭ la rito de la roma misalo de Papo Paŭlo 6a.

BRITUJO. - CARDIFF - Post 14-jara laboro oni ĵus pretigis en Britujo la tradukon de la Nova Testamento en la kimran lingvon. En ĉi tiu traduko, kiu estas la u

nua en la kimra, post tiu de la deksesa jarcento, kunlaboris aparta grupo da tradukistoj, inter kiuj ankaŭ la helpepiskopo de Cardiff, mons. Daniel Mullins.

FRANCUJO. - PARIZO - La katolikaj asocioj por la familio en Francujo enkondukis ĉe la publikaj instancoj precizan "fundamentan jurĉarton" de patrino. Ili aparte proponas, ke oni akcelu statuton por dommastrino, kiu rajtigu al ŝi ĝustan salajron, porsanigan asiston kaj pension. Tiu salajro devus esti plialtigita je la duono, kiam ŝi havas unu filon malpli ol 5-jaran; duobligita en kazo de du filoj malpli ol 5-jaraj kaj por pli ol tri lernojaraj filoj. Asisto kaj helpoj estas antaŭviditaj ankaŭ por vidvinoj kaj disigitaj edzinoj. Por patrinoj, kiuj laboras eksterhejme, la katolikaj asocioj por la familio proponas laboron laŭ reduktita tempo, flekseblajn horarojn kaj eblecon de dujara forpermeso post nasko kun garantio de redungado kaj patrina salajro."Progreso de virino devas esti ankaŭ progreso de patrino", oni asertas en komuniko subskribita de la katolikaj familiaj asocioj, kiu substrekas, ke patrino devas havi en la socio respondecon proporcian al sia misio, kiel ankaŭ rimedojn, kiuj permesu al ŝi surpreni siajn devojn, ĉe aŭ ekster sia propra familio.

OKAZE DE LA 25a DATREVENO de la katolikaj entreprenoj pri loĝdomoj en Bavario, kard. Doepfner skribis artikolon, reliefigante, ke dum tiu arko de tempo la katolika germana entrepreno sukcesis konstrui 270.000 loĝejojn, favore al familioj havantaj malfacilajn financajn eblecojn.

HISPANUJO. - MADRIDO - En paŝtista letero dediĉita al la kampanjo kontraŭ malsato, kiu, iniciate de virinoj apartenantaj al la Katolika Agado, disvolviĝas en Hispanujo, mons. Francisko Alvarez, episkopo de Tarazo

na, admonas, ke plej efika vojo por batali kontraŭ la materia mizero, estas luktadi kontraŭ la morala mizero, bazita sur egoismo. "Humanigi homon, kiu malsatas pri pano, kulturo kaj Dio, pere de lia profunda renoviĝo - asertas la episkopo - signifas klopodon por atingi pliju stan mondon". Ankaŭ la episkopo de Santander, mons. Juan Antono Del Val Gallo, invitas siajn diocezanojn partopreni fervore en la batalo. Li memorigas, ke oni ne devas limiĝi al almozo, kiu povas trankviligi la konsciencon, sed oni devas partopreni en la suferado de la aliaj ĝis memofero.

LA TUTNACIA IRLANDA PILGRIMADO el 1000 fideluloj, gvidita de tri episkopoj: la primaso Mons. Dermot Ryan, ĉefepiskopo de Dublino, Joseph Carroll kaj James Kanavags, estis pilgrimado, kiu altiris la atenton eĉ ekster la preĝejaj ceremonioj. Fakte, inter tiuj mil estis du muzikaj ensembloj inter la plej famaj en la mondo: la "Our Lady's Choral Society" kaj la "New Irish Chambers Orchestra", nomoj tiel famaj, ke de 18 ĝis 24 de majo ili estis konkure ĉiuflanke alvokataj. Por ĉi tiu Jubileo ambaŭ ensembloj kantis en la mesoj de la Papo, en S. Johano, S. Klemento, dum la ĝenerala aŭdienco de 21 majo, en la S. Cecilia Akademio kaj iniciate de lá Itala Radi-Televido, per granda koncerto en la preĝejo de S. Ignaco. Kiel asertis protestanto konata pro sia ekumenismo: "Unueco de kristanoj ne eblas, se ĝi ne kunigas ilin ĉirkaŭ Petro", nordaj kaj sudaj irlandanoj, katolikaj, anglikanaj, metodistaj kaj el multaj aliaj konfesioj, serĉis sian unuecon en Romo, ĉe la Seĝo de Petro. Kaj tiuj, kiuj de longe sekrete kuniĝas por preĝi kune en malgranda urbeto ĉe landlimo de la du Irlandoj, Rostrevor, nun en S. Petro proklamis alte sian volon de repaciĝo kaj de reciproka amo.

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo